

5.^a JARO — N.º 9-10 ☆ ☆ JANUARO-FEBRUARO 1914

Brazila



Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE
BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Elirante ĉiumonate — Aparecendo mensalmente

REDAKCIO — Praça 15 de Novembro

RIO DE JANEIRO

BRAZILIO

B. L. E.

Honora Prezidanto — *Ing.º Everardo Backheuser*

Prezidanto — *Ing.º Alberto Couto Fernandes*

Vicprezidanto — *D-ro João Keating*

1^a Sekretario — *D-ro João B. Mello Souza*

2^a Sekretario — *Ing.º Hernani da Motta Mendes*

Kasisto — *Edmundo Felix Tribouillet*

ENHAVO

10º Congresso Universal de Esperanto. — Monumento ao Esperanto na Austria. — Saluto al la 5ª Brazila Kongreso de Esperanto. — Saluto al Zamenhof. — Saŭdado. — Enigma fako. — Frazaro. — Brazila Gazetaro kaj Esperanto. — A nossa republica. — Kroniko. — O Esperanto no estrangeiro. — Korespondado. — Bibliografio. — Novaj gazetoj ricevitaĵ. — Pri Esperanto. — Regulamento da Brazila Ligo Esperantista. — Anoncoj.

Rio de Janeiro - Brazilio

B. L. E.

— UNUIGO KREAS FORTON

Regulamento

Art. 1º — Fica fundada uma associação sob o nome "Brazila Ligo Esperantista" (B. L. E.), cujos fins são:

Paragrapho 1º — Dirigir a propaganda geral do Esperanto no Brasil.

Paragrapho 2º — Organizar um regulamento para os exames de Esperanto e dar os respectivos diplomas.

Paragrapho 3º — Auxiliar e colligar os grupos esperantistas.

Paragrapho 4º — Representar a opinião dos esperantistas brasileiros que lhe forem filiados.

Art. 2º — A sede da sociedade será na cidade do Rio de Janeiro.

Art. 3º — A "Brazila Ligo Esperantista" consiste de:

- grupos filiados;
- socios fundadores;
- socios isolados;
- socios bemfeitores;
- socios honorarios.

Paragrapho 1º — São grupos filiados todos os que, acceitando este regulamento, pagam uma quota annual de, pelo menos, 15\$000, correspondente a seis socios, á razão de 2\$500 cada um.

Paragrapho 2º — São socios fundadores os que se achavam quites em 13 de Dezembro de 1913.

Paragrapho 3º — São socios isolados todos os que pagam uma contribuição annual de 5\$000.

Paragrapho 4º — E' socio bemfeitor toda a pessoa que fizer á B. L. E. uma doação de, pelo menos, 200\$000.

Paragrapho 5º — E' socio honorario toda a pessoa que prestar grandes serviços á B. L. E. Este titulo será dado por um Congresso Brasileiro de Esperanto.

Art. 4º — A "Brazila Ligo Esperantista" não intervém nas questões que dizem respeito á vida interna dos grupos filiados, que podem livremente agir, segundo os seus estatutos.

Art. 5º — Os socios têm direito:

Paragrapho 1º — Receber gratuitamente o "Brazila Esperantisto", órgão official da B. L. E.

Paragrapho 2º — Tomar parte, pessoal-

mente ou por meio de procuração, nas assembleas geraes.

Paragrapho 3º — Gosar de abatimento nos livros ou outras publicações feitas pela B. L. E.

Paragrapho 4º — Os grupos filiados podem, gratuitamente, publicar, no órgão official, informações sobre o movimento esperantista local.

Art. 6º — Os grupos, cuja sede não fôr no Rio de Janeiro, podem nomear um delegado, ou delegados, com um total de votos egual ao numero de socios quites.

Art. 7º — A "B. L. E." será dirigida por uma directoria composta de um presidente, um vice-presidente, dois secretarios e um thesoureiro.


Paragrapho 1º — A directoria será eleita durante os Congressos Brasileiros de Esperanto, ou em assemblea geral se houver um intervallo superior a dois annos entre dois congressos.

Paragrapho 2º — O presidente pôde escolher auxiliares ou substitutos, conforme a necessidade.

Art. 8º — A directoria é responsavel pelos seus actos perante os congressos, aos quaes apresentará o seu relatório.

As pessoas que desejarem adherir á Liga devem dirigir-se ao Sr. E. Felix Tribouillet, thesoureiro. — Praça 15 de Novembro. O remettente receberá o cartão de socio da Liga.

Quanto á adhesão dos grupos e demais informações, dirigir-se ao Sr. J. B. Mello e Souza, 1º secretario.



PARIS 1914

Vi devas, legi en la arte ilustrita
KONGRESA GAZETO

la cirkulerojn de la Organiza Komitato;
la informojn de la Komisionoj;
la praktikaĵn konsilojn de M. Z. A.;
la artikolojn de famaĵ Esperantistoj;
la nomaron de la Kongresanoj;
la respondon al ĉiuĵ viaĵ demandoj.

SED....

por legi tion, necese estas ricevi la Gazeton.

Ricevos ĝin nur la jam
aligintaj Kongresanoj

VI ALIGU!

Se vi aliĝos ekzemple en Marto, la unua de vi ricevota numero estos la aprila : : :

La unua numero aperis en Januaro 1914.

BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

5-a Jaro

Januaro - Februaro - 1914

Numero 9-10

JARABONO
En Brazilio 3\$000
Eksterlande 5-fr. (2 Sm.)

Elirante ĉu monato - Aparecendo mensalamente
REDAKCIO — PRAÇA QUINZE DE NOVEMBRO
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Specimeno 0, fr. 50 (0. Sm. 20
Num. avulso 300 réis
Helpabono 10\$000

10º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

PARIS — 2-10 Agosto de 1914.

A reunião internacional de esperantistas, marcada para agosto próximo em Paris, constituindo o Decimo Congresso Universal de Esperanto, parece fadada a superar as mais memoráveis e numerosas assembleias de que se tem noticia.

Para o Esperanto já são uma victoria os seus simples preparativos e preliminares.

Nos primeiros dias de fevereiro p. p. o numero de congressistas subia á cifra respeitavel de 1.250 pessoas, das quaes 480 eram da França, 192 da Inglaterra, 103 da Allemanha, 55 da Austria, 41 da Hespanha e 40 da Russia.

O fundo de garantia, organizado em França para supprir as deficiencias que por acaso haja no capital necessario para os gastos do congresso, elevava-se em 31 de Dezembro do anno passado a 54.500 francos!

O congresso se realizará, como sóe acontecer em casos semelhantes, sob os auspícios de uma comissão de patrocínio, da qual fazem parte eminentes personalidades, em cujo numero se contam vinte professores de academias, dois decanos da Universidade de Paris, o director do Instituto Pasteur, cinco senadores, cinquenta deputados, os escriptores Tristan Bernard e Victor Margueritte, quatro *maires*, seis membros do *Hôtel de Ville*, o ex-ministro Besnard, o ex-secretario de Estado Mr. Malvy, o principe Rolando Bonaparte, o presidente da Liga Aeronautica, o presidente do Touring-Club, o celebre aviador Farman, o engenheiro Eiffel e outros.

O congresso funcionará no Palacio Gaumont, vasta casa de espectaculos parisiense com localidade para mais de cinco mil pessoas.

Durante a vigencia dos actos do congresso haverá exposições, representações theatraes, excursões

aos arrabaldes da Capital, sessões scientificas na Sorbonne e um sem-numero de festas e attracções interessantes.

Os jornalistas parisienses, quer da imprensa esperantista ou não, preparam-se para receber os seus collegas estrangeiros por occasião do Congresso em visita a Paris.

Taes são, em largo e rapido debuxo, as medidas já estabelecidas e os actos em perspectiva do grande *rendevuo* de 1914.

De uma das circulares expeditas pelo Comité de Organização tiramos os seguintes apontamentos referentes ás quotas dos congressistas:

Até 1º de junho de 1914 a quota será de 15 francos para cada congressista e de 10 francos para cada pessoa de sua familia. A partir dessa data a mesma será elevada a 25 francos no primeiro caso, e a 20 no segundo.

Dada a hypothese de que qualquer congressista, após o pagamento de sua quota, não possa assistir ao congresso, lhe será ella devolvida, bastando para isso que a proposito seja notificado o Comité antes de 1º de agosto de 1914, descontando-se unicamente a importancia de um franco para as despesas de intercambio.

A todos os congressistas será enviada, independente de outros onus, a «Kongresa Gazeto», publicação official do X Congresso.

Toda e qualquer correspondência deve ter o seguinte endereço: — *Deka Kongreso de Esperanto*, 3, Place Jussieu, 3 — Paris.

F. N.

Cartões postaes commemorativos do 5º
Congresso Brasileiro de Esperanto —
Duzia 600. Para os socios da B. L. E.
500 rs.

Polski Związek Esperantystów

Polska Esperanto-Asocio

Oddział - Filia

Gdańsk, ul. Garncarska 18

Monumento ao Esperanto na Austria

Por proposta apresentada e defendida pelo sr. Eugen Leumam, burgomestre de Franzensbad, a municipalidade dessa importante cidade austriaca aprovou a seguinte decisão:

1º — A cidade de Franzensbad cede á Comissão Organizadora do IV Congresso Austriaco de Esperanto um lugar conveniente, em um jardim publico, para que ahi seja erigido um monumento ao Esperanto;

2º — Inaugurado o monumento, será entregue á municipalidade, a que ficará pertencendo, e pela qual será zelosamente conservado, como os outros monumentos;

3º — A municipalidade fará, a sua custa, os trabalhos preparatorios para a eracção do monumento e contribuirá com tres mil coroas, correndo o excedente de despesa por conta dos esperantistas.

Essa decisão, como era natural, despertou o maior entusiasmo entre os esperantistas não só da Austria, mas de todo o mundo.

A comissão organizadora do IV Congresso Austriaco de Esperanto, presidida pelo sr. Jakob Hechtl, immediatamente expediu circulars a todas as associações e revistas esperantistas, pedindo que todos concorrer para o monumento, orçado em seis mil coroas. Como, porém fosse urgente reunir essa quantia para occorrer ás primeiras despesas e garantir a realização do bello projecto o proprio sr. Hechtl depositou as 3.000 coroas restantes.

Para restituir essa garantia ao dedicado esperantista, a comissão solicitou e tem recebido o auxilio de innumerados grupos e associações esperantistas.

Assim a cidade de Franzensbad, annualmente visitada por milhares de pessoas, na época de banhos, estará brevemente enriquecida com um bello monumento que perpetuará a idéa do idioma internacional victorioso.

A Brazila Ligo Esperantista, desejando concorrer para a erecção do monumento, subscreveu cem coroas, e que lhe dá direito a ter seu nome gravado no bronze. Para fazer face a essa despesa, foi aberta uma subscrição que já conta os seguintes do-nativos:

Brazila Ligo Esperantista .	10\$000
Brazila Klubo Esperanto	5\$000
H. Motta Mendes .	5\$000
A. Couto Fernandes .	5\$000
E. Backheuser	5\$000
M. Souza .	5\$000
Dr. Venancio da Silva	5\$000
Severino de Freitas	2\$000
Arruda Beltrão	2\$000
E. F. Tribouillet	2\$000
Dr. Nuno Baena	2\$000

Saluto al la 5.^a Brazila Kongreso de Esperanto

DE

Dro. Venancio Silva

Sinjoroj Kongresanoj,

La Brazila Klubo «*Esperanto*» plenplezure kaj entuziasme salutas la 5^{an} Nacian Kongreson de Esperanto tie ĉi kunvenintan.

Duobla estas nia hodiaŭa ĝojo: unue, ĉar oni povas diri, ke tiu kongreso estas memoraĵo de la naskiĝdato de nia Majstro, tial ke ĝi fariĝas vera oferdono al la klera eminentulo; due, ĉar ĝi estas kuraĝiganta elmonstro de la disvastigado kaj progresado de Esperanto en nia Patrolando.

Dum la mallongaj tagoj difinitaj por nia Kongreso, la Esperanta vivo centraliziĝas en tiu ĉi ĉefurbo, en la bela salonego de la Komerca Asocio, kien konverĝas la rigardoj de la tuta Brazila Esperantistaro.

La lumturo, kiu gvidas nian vojiradon sur la ribelitaj maroj de kontraŭaĵoj, kontraŭvoloj kaj indiferenteco staras nun tie ĉi, altigita je senmezura alteco, el kie ĝi lumjetas la tutan nian landon, alvokanta kaj gvidanta niajn samideanojn al tiu rondo familia.

Malsimilaj je la lumturoj, tiuj aparatoj, kiujn la homa genio lokas sur la bordoj kaj en la mezo de la maroj por ilumini la vojon al la marveturantoj, kaj por montri al ili la danĝerojn dissematajn ĉirkaŭ iliaj proksimaĵoj, rokojn, rifojn kaj sablamasojn; malsimila je tiuj lumturoj, kiujn ni povas kompari kun la homoj de mirinda inteligenteco kaj spriteco, kies elokventaj paroloj nin delogas, ravas kaj konvinkas, sed kies alproksimeco kaj intimeco estas malprofita, malutila kaj pereiga; nia lumturo heligas nian vojon, nin altiranta ĉiam al ĝia najbareco, neniel enhavanta danĝeron: ju pli ni alproksimiĝas al ĝi, des pli ni estas antaŭgarditaj kontraŭ ĉiuj domaĝoj.

Blanka kaj verda estas la koloroj de nia lumturo: la blanka, simbolo de pureco, brilegas antaŭ niaj okuloj ne blindiganta ilin, sed nin altiranta kaj magnetizanta per la dolĉeco de ĝia brilo; ĝi estas la simbolo de la puraj kaj altaj sentoj de l'esperantismo, altegaj sentoj de paco, de harmonio, de unuiĝo, de solidareco, de reciproka helpado, de unuforma esprimmaniero, kiel unuformaj

estas la homaj vivbezonoj kaj vivaspiradoj.

La pureco kaj sincereco de la sentoj, rebrilo de la blanka lumo de nia gvidilo estas necesega koratributo de ĉiu vera esperantisto; ĉar tra la modesta vestaĵo, la maldika teksaĵo de malriĉa lingvo, oni ekvidas majestatan aparaton, mirindegan aranĝon por la internacia, universala frateco kaj unuiĝo de la gentoj: paca kaj solidarecafero, ĝi bezonas, kiel fundamentan ŝtonon, la bonan kaj sinceran intencon; kaj, ĉar tia estas la sento de la Majstro, lia verko marŝas kaj marŝados ĉiam antaŭen sukcese ĝis plena triumfo.

La verda lumo estas la instigilo malpermesanta al ni la malfortiĝon, la ŝanceliĝon aŭ la svenon; ĝia smeralda koloro kuraĝigas, puŝas nin ĉiam antaŭen sentimaj kaj indiferentaj pri ĉiu baro tra la vojo: altiritaj per ĝia brileco ni vojiradas ĝis la tombrando, kaj kiam la morto alproksimiĝas duone fermanta niajn okulojn, tiu lumo ilin trapasas por heligi la profundajn de la cerbo, ekvekanta la duone mortintan konsciencon, kuraĝiganta la mortanton por la transirado en la Nekonaton. Kiu estas tiu magia lumturo samtempe gvidilo, stimulilo kaj altirilo, simbolo de pureco kaj de espero? Ĝi estas nia standardo, kiu entenas ankaŭ verdan stelon montrantan al ni, kiel la polusa stelo, la nordan regionon, la regionon de la dolĉega kaj pura lumo de niaj idealoj, kien ni direktiĝas.

Bela lumturo! en la tuta mondo ci ne havas konkuranton, la nura standardo, kiu povas konkuri kun ci estas la glora flago de Granda Britujo, kiu eljetas la ombron super vastegajn regionojn, kie la suno neniam subiras; sed ci, esperanta standardo, superas ĝin, ĉar ci balanĉiĝas ne nur super la vastega bieno de la Brita Imperio; sed ankaŭ plie, ci transpasas ĝiajn limojn por projekcii cian ombron sur la tutan teron: senlima estas la sfero de cia agado, tial ke ĝi estas la animo, la koro kaj la konscienco de la homaro.

Brazila Klubo «Esperanto» salutas vin, karaj kongresanoj; estu bonevenintaj, ke viaj agadoj estu ĉiam la efektivigo de la promesoj de nia standardo, kiu siavice resumas la grandkorajn sentojn de nia genia kaj senmorta Majstro. Ke via laboro estu plenprofita kaj utila al nia afero.

Vivu la 5^a Brazil Kongreso de Esperanto!

Vivu D-ro L. L. Zamenhof!


SALUTO AL ZAMENHOF

Al ĉiuj popoloj benatan donacon
Vi faris, trafante la vojon plej bonan:
En koroj de l'homoj eksemis vi pacon,
Sur lipoj semante la lingvon belsonan.

Nun kreskas en mondo spirito homara
Kaj ion el via noblega animo,
Per ĉiu parolo de lingvo la kara
En koroj vastiĝas al vivo sen limo.

EDMOND PRIVAT.

(El «*Esperanto*»).



SAŬDADO

(COELHO NETTO)

I

Vi mortis por mi!

Vi iras kun alia tra la samaj vojoj
kuntrairitaj de ni; vi dormas kun li apud
la samaj fontanoj kaj malfermiĝas viaj li-
poj por gardi la kisojn el liaj lipoj. Nedan-
kema!

Vi mortis por mi!

Vi estas la fatala ombro de mia unua
amo.

II

Mia koro estas silenta tombo. Via ne-
dankemo estas la ŝtono, kiu ĝin fermas; via
nomo Magdaleno, la sola surskribo.

Nokte, kiam mi memoras pri mia es-
tinteco, eliĝas el la fondo de tiu tombo
malgranda flamo, kiu ekkuras tra mia koro.

Flamo, kiu ne bruligas, sed ŝajnas lar-
mo; ĝi estas la saŭdado, la malgaja saŭ-
dado, la erarlumo de la mortintaj feliĉoj.

A. Couto Fernandes.

(Tradukis)



ENIGMA FAKO

Jen estas la solvoj de la aŭgusta numero:
Enigmo 3 — *ekvinokso*; 4 — *patriarko*; Saradoj 9,
10, 11 — *majorano*, *gajakolo*, *petroselo*.



Jen estas la solvoj de l'oktobra numero: Sa-
radoj 12 ĝis 17: *diametro*, *gasometro*, *kardelo-karlo*,
animo-amò, *gazelo-galo*.

Armo ricevos bele binditan ekzempleron de
l'romano de C. Invernizio, donacitan de Vera Plumo,
ĉar li estis la unua diveninto de la oktobra kon-
kurso.

FRAZARO

A — Kio nova?

F — Nenio. Ĉu vi scias ion?

A — Oni babiladas, ke s-ro G. baldaŭ malfermos kurson de Esperanto.

F — Bonega novaĵo! Ĉu por infanoj?

A — Ne, sinjoro, por plenkreskuloj. Mi ne estas tre certa pri tiu afero. Ŝajnas al mi, ke li priparolis kun ia direktoro de kolegio, kiu sin estus montrinta simpatia al nia afero. Kaj s-ro D., ĉu vi vidis lin?

F — Li ĵus foriris el tie ĉi. Se vi estus alveninta kvin minutojn pli frue, vi renkontus lin.

— Que ha de novo?

— Nada. Sabe alguma coisa?

— Fala-se que o sr. G. em breve abrirá um curso de Esperanto.

— Excelente noticia! Para crianças?

— Não, senhor; para adultos. Não tenho muita certeza a respeito. Parece-me que elle tratou com um director de collegio, que se teria manifestado sympathico á nossa causa. E o sr. D., viu-o?

— Acaba de sahir d'aqui. Se o senhor tivesse chegado cinco minutos antes, tel-o-ia encontrado.

N. B.

Brazila Gazetaro kaj Esperanto

Jen estas la listo de la de ni ricevataj brazilaj gazetoj kaj revuoj, kiuj dum la monatoj Oktobro, Novembro kaj Decembro publikigis artikolojn kaj informojn pri Esperanto:

Acre. — *O Paladino* (Xapury).

Pará. — *Correio de Belém* (Belém).

Maranhão. — *O Norte* (Barra do Corda), *Diario Official* (S. Luiz).

Ceará. — *A Estrella* (Aracaty), *Unitario* (Fortaleza).

Pernambuco. — *Jornal do Recife*, *A Provincia kaj Pernambuco* (Recife).

Alagôas. — *O Commentario*, *O Semeador*, *Diario Official kaj Jornal de Alagôas* (Maceió).

Sergipe. — *Diario da Manhã kaj O Estado de Sergipe* (Aracaju).

Bahia. — *Diario de Noticias kaj O Correio* (S. Salvador), *O Jaguaribe* (Jaguaribe), *O Conservador* (Nazareth).

E. Santo. — *A Cruzada*, *A Tribuna kaj Diario da Manhã* (Victoria).

Stato Rio. — *O Fluminense*, *Gazeta da Manhã kaj Diario Fluminense* (Niteroi), *Ribeironense* (S. José do Ribeirão), *A Sapucaia* (Sapucaia), *A Aurora* (Valença), *O Estado do Rio* (Parahyba do Sul).

S. Paulo. — *A Gazeta*, *A Platéia*, *Correio Paulistano kaj Diario Popular* (S. Paulo), *O Clarim* (Mattão), *A Tribuna de Santos kaj A Noticia* (Santos), *O Pirapetinga* (Pirapetinga), *Diario do Povo kaj Cidade de Campinas* (Campinas), *A Folha* (Jundiahy), *Correio do Norte* (Guaratinguetá).

Paraná. — *Monitor Espirita* (Curityba).

S. Catharina. — *A Epocha*, *Jornal do Commercio*, *O Dia kaj Folha do Commercio* (Florianopolis), *O Astro* (S. José), *Região Serrana* (Lages).


Rio Grande do Sul. — *Echo do Sul* (Rio Grande), *O Brasil Philatelico* (Cachoeira), *A Opinião Publica kaj O Diario Popular* (Pelotas), *Eternidade* (P. Alegre).

Minas Geraes. — *O Estado*, *Diario de Minas kaj Minas Geraes* (B. Horizonte), *Correio do Araxá* (Araxá), *O Guaxupé* (Guaxupé), *Lagôa Santa* (Lagôa Santa), *Alavanca* (Santa Maria), *Diario Mercantil* (Juiz de Fôra).

Goyaz. — *A Imprensa* (Goyaz).

Matto Grosso. — *A Opinião Publica kaj Tribuna* (Corumbá).

Rio de Janeiro. — *O Imparcial*, *O Paiz*, *A Noite*, *Jornal do Commercio*, *Correio da Manhã*, *A Epoca*, *Jornal do Brasil*, *Gazeta de Noticias*, *Folha do Dia*, *A Noticia*, *O Seculo*, *A União Social*, *A Tribuna*, *A Mocidade*, *Jornal do Commercio da Tarde*, *O Diario*, *O Malho*, *O Rio Ilustrado*, *Figuras e Figuras*, *Mensagem Postal*, *O Jornal Baptista*.



MR. JOHN E O ESPERANTO

Mister John, que causa espanto,
Nesse afan de propagar,
Sobre a lingua do Esperanto
Tanto falla, falla tanto
Que nos faz... *deseesperar!*

— — —

ROBERTO A MR. JOHN

Quem durante cinco annos
Vae á Escola e estuda tanto,
Deve sahir bacharel
Ou professor de Esperanto.

R.

(Extrahidos d' A Nossa Republica, por J. Meluza).

KRONIKO

Acre.—«O Paladino», gazeto, kiu aperas en *Xapury*, kaj kies ĉefa redaktoro estas s-ro Carneiro Meira, ano de B. L. E., ĉiam publikigas informojn pri nia movado.

Pará.—Ni esperas, ke la movado en *Belem* reviviĝos dank'al klopodoj de s-ro Durval de Sant'Anna Lopes, delegito en tiu ĉi ŝtato de la 5^a Brazila Kongreso de Esperanto.

Maranhão.—La gazeto «O Norte» de *Barra do Corda* publikigis la gratulajn leterojn senditajn al la redaktoro s-ro João Quadros pro lia lerta lernado de Esperanto dum malmulte da tagoj kaj pro lia propaganda artikolo pri kiu ni parolis en la lasta numero.

Parahyba do Norte.—Kiel ni jam diris, la Prezidanto de tiu ŝtato sendis specialan delegiton al la Kvina Kongreso, kaj monhelpis nian movadon. Tiu delegito, la klera Pastro Mathias Freire, reveninte al tiu ŝtato publikigis belan artikolon kun fotografoj en la ĵurnalo «União», oficiala organo de l'Registaro. Tiu fakto certe tre helpas la esperantan movadon en Nordo de Brazilio kaj la klopadojn de niaj samideanoj en Sergipe, kunvenejo de la Sesa.

Pernambuco.—S-ro Manoel Feodrippe de Souza malfermis kurson de Esperanto en lia lernejo, kiu funkcias en *Recife*.

Alagoas.—«A Semana» de *Penedo* publikigis artikolon pri la Kvina Kongreso, kaj finis ĝin promesante aperigi la esperantan gramatikon, kaj dirante ke tiel ĝi estas certa fari bonan servon al ĝiaj legantoj.

Sergipe.—La tieaj esperantistoj lerte gvidataj de nia klera samideano d-ro Alcibiades Paes forte laboras por la 6^a Brazila Kongreso, kiu okazos dum la monato Januaro de 1915^a. La ĵurnaloj de *Aracajú* «Diario da Manhã» kaj «O Estado do Sergipe» entuziasme ricevis la sciigon pri la loko elektita de la Kvina por la Sesa kaj aperigis artikolojn per kiuj ili diras, ke tio estas vera honoro por la ŝtato Sergipe. Unu el tiuj artikoloj estas skribita de s-ro Mauricio Cardoso.

Bahia.—En *S. Salvador*, ĉefurbo de tiu ŝtato, fondiĝis futbala Klubo nomata «Esperanto».

Ŝtato Rio.—La 7^{an} de Decembro d-ro E. Backheuser faris alian paroladon en Spirita Federacio de *Nitheroy* pri Esperanto kiel proksimigilo al homa frateco.

— En Januaro komisiono konsistanta el

fino Julia Fernandes, droj E. Backheuser kaj Couto Fernandes, je nomo de esperantistoj de Rio faris viziton en *Nitheroy* al d-ro March, konata laŭ la nomo «kuracisto de l'malriculoj». Li estas malnova esperantisto kaj, malgraŭ maljuna kaj tre malsana, likorespondas kun multaj amikoj, en Esperanto.

— En la programo de la konata «Colégio Americano Brasileiro», en *Campos*, vidiĝas la instruado de Esperanto, kune kun aliaj vivantaj lingvoj. Direktas la kurson la direktoro mem de la lernejo, d-ro Alipio Dorea: niajn gratulojn!

Rio de Janeiro.—Al ĉiuj ĵurnaloj en Brazilio, Brazila Ligo sendis kolekton de artikoloj pri Esperanto aperintaj en la gazetoj de Rio de Janeiro okaze de la Kvina Kongreso, kaj ankaŭ resumon de la festoj kaj ĉefaj decidoj alprenitaj: multe de la ŝtataj ĵurnaloj ilin transskribis resume aŭ tute.

— «O Mensageiro Postal» gazeto de poŝtoficistoj publikigis bonan propagandan artikolon.

— Je la 10-a de Januaro la anoj de Brazila Klubo «Esperanto» dediĉis *teon* al fino Cecilia Curvello, reprezentantino de l'samideanoj de ŝtato Sergipe ĉe la Kvina Kongreso Brazila de Esperanto, d-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de Brazila Ligo, faris paroladon, tostante la samideanojn de Sergipe en la persono de d-ro Alcibiades Paes, vera, vigla batalanto en tiu Norda ŝtato. Dum la festo beleta pupo estis donacita al la sesjara knabineto, la plej malgranda kiu deklamis kaj lerte diris poezion dum la Kongreso, Hilda Teichholtz.

— Ricevis *ateston pri lernado* fino Cecilia Curvello kaj s-ro Theophilo de Almeida.

— Je la unua de Februaro okazis la dumonata kunsido de *Virgna Klubo* en lernejo «Carmen Silva». La organizintino de la festo estas s-ino Barbara Neves. Kiel ĉiam oni aŭdis deklamojn, poeziojn, kantojn, ludojn sur fortpiano, k. c.

— Foriris al Parahyba do Norte la klera Pastro Mathias Freire, prezidanto de la tiea Ŝtata Parlamento, kaj kiu estis veninta al Rio nur por ĉeesti la Kvinan Kongreson de Esperanto, kies prezidanto li estas elektita.

— Je la 6-a de Februaro estas inaŭgurita kurso de Esperanto en la lernejo «Baggi de Araujo», direktata de la filinoj de nia neforgesebla samideano d-ro Baggi de Araujo. Ili intencas malfermi alian kurson speciale por fraŭlinoj, kiu okazos dufoje ĉiusemajne.

— **Nia Klera samideano** d-ro Nuno Baena, kuracisto de la Mara Armeo, profitis la ekzercadojn de la manovroj por fari kurson en la krozŝipo *Bahia*. Preskaŭ ĉiuj oficiroj kaj ankaŭ la ŝipestro sekvis tiun kurson, okazintan ĉiutage. La rezultatoj estas tre bonaj, ĉar ĉiu el ili konas almenaŭ tri lingvojn.

— Je la naŭa de Februaro estas balotita nova estraro por «Brazila Esperantista Klubo», filiita al *Asocio de Kristanaj Junuloj*; ĝi nun konsistas el s-roj: Jorge C. de Azevedo Marques, prez.; Antonio Ignacio da Costa, vicprez.; Octavio Macedo, unua sek.; Odilir de Souza e Silva, dua sek.; Plinio Pinto, kasisto.

S. Paulo. — «A Platêa» de S. Paulo daŭrigas publikigi en siaj kolonoj kurson de Esperanto, direktatan de d-ro Haroldo Amaral.

— En «A Tribuna de Santos» aperis propagandaj artikoloj de s-ro Zozimo Lima.

— S-ro Gomes dos Santos skribis en «Correio Paulistano» artikolon kontraŭ Esperanto, sed li estas tute venkita per alia artikolo, en tiu sama ĵurnalo, aperita de d-ro Haroldo Amaral. Pri tio ankaŭ aperis artikolo en «O Paiz» de Rio de Janeiro.

— En la urbo Santos baldaŭ estos fondata esperantista grupo kaj la profesoro diplomita s-ro Clarindo Diniz Gonçalves malfermos esperantan kurson. Direktas nun kurson per korespondado s-ro Luiz Paes.

Rio Grande do Sul. — «O Brasil Philatelico», kies direktoro estas nia malnova samideano d-ro Benjamin Camozato, kaj kiu ĉiam aperigas informojn pri Esperanto, publikigis en sia januara numero portreton de s-ro Carlo Bourlet kaj poezion al li dediĉitan.


Minas Geraes. — En Santa Maria la ĵurnalo «Alavanca» publikigis bonan artikolon de s-ro Alcindo Terra.

— «Diario de Minas» de Bello Horizonte kaj «Diario Mercantil» de Juiz de Fora aperigis tre bonajn artikolojn pri Esperanto kaj ĝia Kvina Kongreso en Brazilio.

— En Januaro la distinginda anino de «Gremio Litterario Ruy Barboza» f-ino Carmelita Moreira faris belan paroladon pri Esperanto kaj proponis, ke oni fondu Esperantistan Grupon en Bello Horizonte, filiita al tiu «Gremio». Tiu propono estas entuziasme akceptita kaj ni esperas tre baldaŭ ricevi la sciigon pri ĝia efektiviĝo. La malnova esperantisto s-ro José Felipe Coutinho proponis siajn servojn kiel profesoro

al la estontaj aninoj, kiuj estas ankaŭ lernantinoj de konata kolegio Cassão. Pri tio skribis bonan artikolon en gazeto «Minas Geraes» oficiala organo de la Ŝtata Registaro, s-ro Azeredo Netto.

M. M.



PORTUGALUJO

La plej grava okazintaĵo en Portugalujo lasttempe estas sendube la starigo de «Portugala Esperanto Asocio», kies organiza komitato konsistas el s-roj J. A. Proença, prez.; J. Moreira da Silva, vicprez.; J. Teixeira Barroca, 1^a sek.; J. Dias da Silva, 2^a sek. kaj A. Mattos Carvalho, kasisto. Ĝia sidejo estas en «Rua do Rosario, 215-1^o, Porto kaj ĝia oficiala organo la «Portugala Revuo».

Lisbono. — Ĉe la sidejo de l' «Kristana Unuiĝo de l' Junularo» efektiviĝis la 15^{an} de Decembro solena kunsido por festi la datrevenon de l' naskiĝtago de d-ro Zamenhof kaj transdoni premiojn al la plej bonaj lernintoj en la ĵus finita kurso.

La gazetoj lisbonaj presigis belajn kaj longajn raportojn pri la festo.

— En aprilo de 1914 okazos en Lisbono granda nacia kongreso de komercaj kaj industriaj asocioj. Du tezoj pri Esperanto estos prezentataj al la kongreso. — S-ro Bemaldo malfermis du novajn kursojn.

Porto. — La tiea grupo festis la datrevenon de d-ro Zamenhof. — Jen estas la nova estraro de tiu grupo por la jaro 1914: prez. — d-ro Sá Varela; vicprez. — d-ro Antonio Barradas; 1^a sek. — f-ino Maria Margarida de Macedo e Faro; 2^a sek. — s-ro Nuno de Melo kaj kas. — s-ro Raul Correia.

— La grava ĉiutaga gazeto «Comércio do Pôrto» publikigis artikolon de s-ro Proença refutantan kronikon de s-ro Alberto d'Oliveira presitan en brazila gazeto.

Funchal. — (Insulo Madejro). Je la 9^a de Novembro, efektiviĝis solena festo pro la unua jardatreveno de l' starigo de l' grupo «Madejra Verda Stelo». Prezidis la kunvenon s-ro Ezequiel F. Vellozo, redaktoro de la grava ĉiutaga ĵurnalo «Diario da Madeira», kiu publikigis belan raporton pri tiu festo.

(El «Portugala Revuo»)

O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

Inglaterra. — Na séde da Administração Postal, em *Londres*, muitos empregados receberam attestados de exame de Esperanto e fundaram uma sociedade com o fim de propagar essa lingua internacional. — Em *Barrow*, os cursos de Esperanto são annunciados por meio de fitas em dois cinematographos. — Durante o anno de 1913, na Camara Commercial de *Londres*, 17 alumnos receberam o attestado de estudo e dois o diploma de professor. — Em *Croydon* abriu-se um curso na Escola Polytechnica sob os auspícios da Municipalidade.

Suecia. — Activa-se a propaganda do Esperanto nesse paiz. Novos cursos foram abertos em *Boras*, *Stockolm*, *Norrköping* e *Solleftea*. Em *Boras*, o grupo local organisou uma excellente exposição. — Teve um resultado extraordinario o curso aberto pelo sr. *Helsing* em uma escola popular de *Gefle*.

França. — Os Estados Geraes do Turismo Francez, reunidos na Sorbonne, em *Paris*, em fim de 1913, approvaram por unanimidade uma moção favoravel ao Esperanto. Nessa moção elles exprimiram o desejo de que «todas as associações francezas de Turismo, syndicatos de iniciativa, etc., ajudem e promovam ainda mais a diffusão do Esperanto e que tambem procurem chamar para essa questão as vistas dos poderes publicos». — Na prova final do «Concurso Michelin», realisada em *Paris*, em Novembro ultimo, obteve o 1º premio (2.000 francos) o sr. *Lelarge*, de *Poitiers*, que conta 19 annos. — Promette ter um successo colossal o 10º Congresso Universal de Esperanto. Em 25 de Fevereiro já se achavam inscriptos 1.250 congressistas!

Allemanha. — Os jornaes allemães cada vez mais interessam-se pelo movimento esperantista. De Outubro de 1912 a Setembro de 1913 appareceram 2.528 notas e artigos sobre o Esperanto em 1.019 cidades allemãs! — A exposição organisaada pelo grupo de *Bochum* foi visitada por mais de 1000 pessoas. Em seguida abriram-se 8 cursos, dos quaes 1 para empregados do correio. — O rei da Bavieira mostrou-se favoravel ao Esperanto. — No numero de Janeiro do «Germana Esperantisto» lemos que nos ultimos mezes de 1913 fizeram-se 19 conferencias em 13 cidades, abriram-se 21 cursos em 19 cidades e fundaram-se 4 grupos. — Na exposição internacional de Artes Graphicas, que se realisará em *Leipzig*, de Maio a Novembro do corrente anno, o Esperanto terá o seu pavilhão especial, na rua das Nações.

Austria. — Na «Egreja dos Cavaleiros Allemães», em *Vienna*, realisam-se mensalmente predicas e cantos em Esperanto. — O director *Weyde* introduzio o Esperanto na Nova Academia do Comercio de *Vienna*. O Club «Danubio» desta cidade obteve permissão para abrir uma escola para o en-

sino do Esperanto, cujo director é o professor *Kaftan*. Fundou-se a «Instruista Unuigo Esperanto», cujo unico fim é a introdução da lingua auxiliar nos programmas das escolas publicas. Só os professores dessas escolas podem fazer parte da referida associação. — Brevemente será inaugurado em *Franszensbad* o primeiro monumento dedicado ao Esperanto, um gigantesco obelisco, que importara em 6.000 coroas. Metade dessa importancia foi offerecida pela Municipalidade da referida cidade, que fará tambem a sua custa os trabalhos preparatorios para a erecção do monumento.


Suissa. — Fundou-se em *Berne* a Liga Universal de Maçons, cuja unica lingua official é o Esperanto. O presidente é o senador dr. *Magalhães Lima*, de *Lisbôa*.

Italia. — A exposição internacional de hygiene e de industria maritimas, que se abriu em *Genova*, em Março proximo, resolveu adoptar o Esperanto como lingua official para suas relações internacionais. Um guia da exposição e um lindo cartão postal de propaganda redigidos nessa lingua foram editados pela commissão organisadora. — Fundou-se a Sociedade Esperantista dos Estudantes Italianos, a que pertencem estudantes de todas as escolas secundarias e superiores do reino.

Japão. — Um esperantista inglez recebeu do principe *Tohugawa*, presidente da Camara dos Pares do Japão, uma carta redigida em Esperanto. — Os esperantistas de *Tokyo* reuniram-se ha pouco tempo no «Café Paulista» em um jantar intimo afim de tratarem da organisação de um dicionario esperanto-japonez. Os jornaes locais deram noticias detalhadas dessa reunião. Um exemplar do «Japan Times» foi gentilmente remettido ao presidente da B. L. E. pelo dr. *Barros Pimentel*, Encarregado dos Negocios do Brazil no Japão.

Chile. — O sr. *Maximiliano Poblete*, 1º Alcaide da Camara de *Antofagasta*, acceitou o diploma de membro honorario do Grupo local e prometteo estudar o Esperanto. — Adheriram tambem, graças aos esforços do conhecido esperantista s-ro *Sepulveda Cuadra*, o s-ro *Gustavo Bittner*, traductor official do Ministerio do Exterior e os professores de linguas srs. *Germano Sperling* e *Frank Gomien*.

A. C. F.



KORESPONDADO

S-RO ELEUTERIO ROSARIO CAMPO
— *Porlamar, Insulo Margarita, Venezuela*,
— deziras korespondi per ilustritaj postkarto.

S-RO L. PHILIPPE — 159, rue de Paris
— *Voisinlieu — Allonne, Oise, Francujo*, deziras intersangi postkartojn kun la tuta mondo.

BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

La Akso de la Imperio. — Tre interesa reklamo pri la "The Colonial Mutual Life Assurance Society Limited (of Australia)", kiu estas konfesata kiel unu el la plej bonaj el la Brito-Koloniaj Vivasekuraj institucioj. Bonvolu sin turni al «La Speciala Esperantista Korespondanto kaj Agento de la Societo, S-ro Rhodes Marriott, F. B. E. A., 9, Albert Square, Manchester. Anglujo.

La Kamena Angulo, — Familia dramo en du aktoj verkita de H. T. Craven. El la angla lingvo tradukis Cego (Tradukinto de *Kara Panjo*) Presa Esperantista Societo. — 35, rue Lacépède — Paris — Prezo: Fr. 0,75 (0,300 Sm).

"Tabloid" Unua Helpejo. — Bona reklamo de la grava firmo Burroughs Wellcome & Co — Londono Anglujo.

Generala Katalogo de la Esperantista Centra Librejo. — Gillet kaj Kio. 51, rue de Clichy — Paris — Unua eldono 1913.

Intermita Sciigo. — Noj. 2, 3, 4, 5 kaj 6. La Pacparlamento kaj ĝia organizo. — La milito, kristanismo kaj paclaboro. Pac-himno. — La instiguloj por la neantoj de defendeĵo. La nuna pozo de la pacafero. De infanterikapitano *Brynjulf Jhss. Klingenberg.* Kristiania. Norvegujo.

En la lando de la Blanka Monto. — Verkita de *Léon Huot-Sordot.* El la franca lingvo tradukis D-ro Noël. Kolekto de «Lingvo Internacia». Presa Esperantista Societo. — 33, rue Lacépède. — Paris — Prezo: 0,400 Sm.

Fabrikado de l'metala Shribilplumo, laŭ broŝuro eldonita de *Heintze kaj Blanckertz,* de Berlin. El la germana lingvo esperantigis Supera Poŝtasistanto Jablonski (Breslau).

Orienta Almanako el la lingvoj araba, armena, ĉeĉena, hebrea, hinda, hina, japana, kartvela, lezgina, sanskrita kaj tata. Kun antaŭparolo de *B. Kotzin,* redaktoro de «La Ondo de Esperanto», Literatura aldono de tiu ĉi bonega revuo. El la antaŭparolo: »... Certe en la Almanako oni trovos pliparte verkojn kies traduko ekzistas en neniuj lingvoj «natura». Ilin retradukante el Esperanto en la naciĝan lingvaron, oni tiamaniere propagandos efektive nian lingvon, demonstrante ĝian praktikan utilon..... Kun plezuro ni permesas la retradukon el la Almanako (kondiĉe, ke oni citu la devenon).....». Prezo: Sm 0,95 afr. — Librejo «*Esperanto*». 3, Lubgansky proezd, Moskvo, Rusland.

NOVAJ GAZETOJ RICEVITAJ

La Radio, Eldonisto: S-ro Georg Davidov — Poŝtkesto n.º 12 — Saratov — Russie. Prezo 10 Sd.


Gazeto de Dekaj Kongreso. Senpage sendata al ĉiuj kongresanoj. Administracio: 3, place Jussieu, Paris.

Fluganta Skribilo. Stenografia monata gazeto. Administracio: 9 Bd. Voltaire Issy — les Moulineaux — Seine Francujo. Jarabono: 0,60 Sm.

La France Espérantiste. Organe national de propagande et d'information. Public les communiqués officiels de la S. F. P. E. et des Groupes espérantistes français. Rédaction et administration — 3 rue Sophie — Germain — Paris. Abonprezo: 0,90 Sm.

Esperantistoj, kiam vi deziras aĉetian ajn objektojn el Germanujo, turnu vin al *S-ro Georg F. Klefe, Lübeck, Untertrave 8 I,* kaj postulu kontraŭ respondkuponon aŭ poŝtmarkojn prezinformojn. Li ĵus fondis novan komercan agentejon por akceli plivigligon de interrilatoj ĉiulandaj.

Esperantia entrepreno de U. E. A.




PRI ESPERANTO

Por ekspozicio kaj paroladoj de propagando farotaj pri la helpa lingvo Esperanto de l'«Ekspedicio Rio-Branco», kiu trairados Brazilion en ekskurso de studo kaj diskonigo, oni petas al ĉiuj eldonistoj je presaĵoj la komplezon sendi ekzempleron al D-ro Toledo de Loyola, Hotel Central, Campos, Estado do Rio, Brazilio.

Li sendas informojn, korespondas per leteroj, interŝanĝas poŝtkartojn, ktp. Li akceptas agenteojn, reprezentadojn, komisionojn kaj servojn.

Por fari plej grandan diskonigon de tiu-ĉi afero, oni petas la represon de ĉi-tiu cirkulero.



Diccionario Portuguez-Esperanto

COMPILADO POR

Tobias R. Leite

Broŝurita.

2\$500

Bindita

3\$000

ACETEBLA ĈE

Francisco Alves & Co.

166, Rua do Ouvidor. — Rio de Janeiro

Jus aperis:

MANFRED. poemo de *Lord Byron.* El la angla drama poemo esperantigis *D-ro Venancio da Silva.*

Prezo..... 1\$000 (1 fr.)

Aĉeteblo ĉe S-ro G. Lima. Rua S. José, 18.

RIO DE JANEIRO

Sensacio en esp. literaturo!

«EL PARNASO DE POPOLOJ»

Jubilea libro de esperanta poezio kaj de ĝia Majstro, s-ro Antoni Grabowski.

Ĝi estas 240 paĝa, bela volumo kaj enhavas tre abundan kaj plenan kolekton de poemoj originalaj kaj majstre tradukitaj dum 25 jara literatura agado de s-o Grabowski.

el 30 lingvoj!

Ĝi estas vera antologio de tutmonda poezio.

La unikan libron devas posedi ĉiu amanto de belo, poezio, ĉiu organizanto de esp. koncertoj, ĉiu deklamanto aŭ kantisto kaj fine ĉiu esp. grup.

La prezo de la libro estas:

1.00 Sm. kun sendelspezoj — 15.1 Sm.; luksa eldono sur plej bela papero kun portreto de la aŭtoro — 2.00 Sm. kun trasendo — 2.25 Sm.

La libro estas *senpage* aldonata al ĉiu abonanto de «*Pola Esp.*», kies jarabono kostas 2.65 Sm.

● Rapidu do aboni «*P. Esp.*» aŭ mendi la libron aparte. — La mendojn oni sendu al *Red. de Pola Esp. Varsovio str. Sopena N. 8.*

Oni povas ankaŭ mendi pere de «*Brazila Esperantisto*».

LA MOVADO

Monata Universala Gazeto (Propagando, Informo, Komercio, k. t. p.).

L' Esperantiste Français

Bulletin officiel de la Société Française pour la propagation de l' Esperanto.

Redakcio. — Administracio: 61, Bd. St — Marcel. Paris.

Jarabono, fr. 3,25 (S m 1,300).

Ju pli multa estas l'abono

Al *La Movado*.

Des pli granda estas la bono

De *La Movado*.

A NOSSA REPUBLICA

(Não é politica. . .)

Por J. MELUZA

Preço. \$000

A' venda na sede da Brazila Ligo Esperantista, á Praça 15 de Novembro.

«La Ondo de Esperanto»

Monata ilustrata revuo

(fondita en la jaro 1909).

ĈIU ABONANTO DE LA J. 1914,

krom 12 n-roj de l'gazeto, ricevos *donace* belan Esper. libron.

ESPERANTA POSKALENDARO POR LA JARO 1915.

„La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton, novstila. Ĉiu n-ro havas 16-24 paĝ. Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno (kontraŭ **Ido**). Amuza fakto (kun premioj). Anekdotoj. Korespondoj tutmonda. (Postk. ilustr.).

ANONCO EN KORESP. FAKO»

3 RESPONDKUPONOJ

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm.) oni sendu al librejo „*Esperanto*“ (Moskvo, Iubjanskiĵ proezd, 3, Ruslando) aŭ aliaj Esper. librejoj postmandate, respondkupone, papermonie, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekanko.



Curso Elementar de Esperanto

em 28 lições por

M. Mendes e C. Fernandes

PREÇO 1\$500

A' venda nas principaes livrarias e na Séde do Brazila Klubo «*Esperanto*», á Praça 15 de Novembro.



O Brasil Philatelico

Revista literaria, mensal, illustrada dos colleccionadores de sellos, cartões postaes e dos esperantistas, com circulação em todo o mundo.

Única, no genero, no Brasil.—4º anno.—Assignatura annual, com direito a premios, 3\$000.

Cada numero traz, além de varios artigos sobre o Esperanto, sellos e cartões postaes, grande numero de annuncios de colleccionadores de todo o mundo.

Sem demora, peçam um numero specimen, que,

com prazer, sera' enviado pelo seu director-proprietario,

EM Cachoeira (RIO GRANDE DO SUL).

TARIFO POR ANONCOJ

1	Paĝo Sm. 15.....	20\$000
1/2	" " 8...	12\$000
1/4	" " "	7\$500
1/8	" " "	4\$000

Por 2 foja anoncado rabato da 15 %
 Por 3 " " " 20 %
 Por 6 " " " 30 %



OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

Organo de la Lingva Komitato kaj de la
 Konstanta Komitato de la Krongresoj
 Jara abono 5 fr.
 Aperas ĉiumonate, krom en Septembro.
 Ĉiuj esperantistoj devas ĝin aboni.
 Redakcio kaj administracio:
 51, rue de Clichy,—Paris.



Portugala Revuo

ĈIUMONATA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
 PORTUGALAJ

Jarabono 1,60 Sm
 (700 reis fortes)

Redaktejo kaj administrejo :
 215. Rua do Rosario, 215
 PORTO — PORTUGALUJO



ITALA LINGVO

Per Esperanto

Itala Lingvo estas tiel simila al Esperanto
 ke ĉiu Esperantisto povas per nur unu leciono
 ĝin legi, per dudek lecionoj ĝin kompreni.

Sekve revueto «L'Esperanto» iniciatas in-
 struon de lingvo itala per ĉiulandaj Esperan-
 tistoj, ĝin prezentante sub esperanta alfabeto.

Lecionoj aperas regulare la 10.an kaj la
 25.an de ĉiu monato.

Abonu sendante 1 Sm. al Eldonisto :

A. PAOLET — S. Vito al Tagliamento
 (Udine, Italujo)



Livros em Esperanto

Aĉaŭn-se ĉi vende na Livraria Jacintho Silva, 4 rua
 Rodrigo Silva n. 7, na Livraria Alves, 4 rua do Ouvidor,
 106 e na Livraria Gomes Pereira, r. Ouvidor, 91, diver-
 sos livros em Esperanto.

Vortaro Esperanta Portugala


KOMPILITA DE TOBIAS R. LEITE

Um volume in 16, 176 paĝa..... 1\$500

Aĉetebla de

Francisco Alves & C.

166, rua do Ouvidor.—Rio de Janeiro.



LINGVO INTERNACIA

Monata Centro Organo de la Esperantistoj
 nur en Esperanto (48 p. 13 X 20)

Jara abono 5 fr. (2 Sm)

Administracio: Presa Esperantista Societo.
 33, rue Lacépède, Paris.



LA REVUO

Internacia literatura Gazeto. Kun la kons-
 tanta kunlaborado de Dro. Zamenhof.

Jara abono 7 fr.

Redakcio kaj Administracio Librejo Ha-
 chette & C., 79, Boul. S. Germain. Paris.



DR. JOSE ARTHUR BOITEUX

ADVOKATO

Strato Hospicio, 24

RIO DE JANEIRO



LIVROS

Na séde do Brazila Klubo, á Praça 15 de
 Novembro n. 2, 2º andar, encontram-se á venda
 os seguintes livros :

Brazilio. Parolado de Sro. E. Back-
 heuser..... 1\$000

Methodo theoricu e pratico do esperanto
 por Honorio Rivereto 1\$000

Lina, comedia, por Pedro A. Cou-
 tinho 1\$000

Esperanto. Conferencia do Dr. An-
 tonio C. de Arruda Beltrão..... \$500

Karlo, facila legolibro, de Privat.. \$500

Parizina, poema de Byron, esperan-
 tigitita de Dr. Venancio da Silva 1\$000

Chaves de Esperanto..... \$050

Curso Elementar de Esperanto, por
 M. Mendes e C. Fernandes..... 1\$500

Manfred, drama poemo de Byron,
 esperantigitita de Dr. Venancio da Silva. 1\$000

Ha tambem cartões postaes de propaganda, pelo preço
 de 50 rs. cada um, ou 600 rs. a dúzia.